Esperanto

EN SKOTLANDO

OFICIALA BULTENO DE LA
SKOTA FEDERACIO ESPERANTISTA

Ĉion por la Redaktoro sendu al:
TOM FRASER,
2 Lady Helen Street,
Kirkcaldy, Fife.

Abonojn sendu al la Kasisto:
F-ino ANNE EYRE,
17 Kelvin Gardens, Hillhouse,
Hamilton, Lanarkshire.

ESPERANTO EN SKOTLANDO

La Oficiala Bulteno de la Skota Federacio Esperantista

N-ro 53 Vintro 1963/4 Jarabono 3ŝ. (6 steloj)

Atenta leganto jam estus rimarkinta, ke ŝanĝo okazis pri nia Bulteno - la prezo estas plialtigita ĝis 3 ŝilingoj. Tion decidis la Konsilantaro ĉe sia lasta kunsido pri kiu raporto aperas sur alia paĝo. Ni esperas, ke malgraŭ ĉi tiu vere modesta pliiĝo kiu vere nur rekonas la ŝanĝon en la valoro de Brita mono, la ĝisnunaj abonantoj reabonos nian organon. Ni aparte ŝatas la subtenon de tiuj kiuj ankaŭ abonas por siaj eksterlandaj amikoj. Tio konigas "Esperanto en Skotlando"n en aliaj mondpartoj kaj estas facila maniero daŭrigi kontakton kun transmaraj plumamikoj. Frua reabono nian laboron - kaj abonilo troviĝas en ĉi tiu numero! multe faciligas

NIA JAR-KONGRESO 56a okazos de vendredvespero la 22an, ĝis dimanĉo la 24a de Majo, en Carberry Tower, 9 mejlojn sudoriente de Edinburgo. Ĉi tiu bela loko estis antaŭe nobela reĝidenco sed donaciĝis al la Skota Eklezio. Ĝi havas ĉian oportunaĵon por kongreso kaj ĝia komfort. kaj agrableco decidigis la Kongreskomitaton ne okazigi ekskurson el ĝi - kiu bone sidas lokon ne ŝanĝu! Sekretarias S-ino Mary C. Black, 174 Montgomery Street, Edinburgh,7, kaj kvankam aliĝiloj dissendiĝos al la Grupoj kiel kutime, la reguloj necesigas, ke ni diru al la administranto antaŭ la fino de Februaro la atendatan nombron de partoprenontoj. Tre helpus do, se vi tuj skribus al S-ino Black dirante ke vi nepre, verŝajne aŭ espereble ĉeestos dum kiu(j) tago(j). La kosto estos nur 30 ŝilingoj por ĉiu plena tago (22/9 por gejunulo).

Parto de la funkcio de distrikta Esperanta gazeto estas prezenti al la cetera Esperantujo siajn specialaĵojn. Januaro estas tre taŭga monato por ni ĉar je ĝia 25a tago Skotoj festos la datrevenon de la naskiĝo de Robert Burns. Du eroj en la nuna eldono honoras lian memoron - nova traduko de "Mary Morrison" (kiel poemo) farita de Reto Rossetti, al kiu ni ŝuldas varman dankon pro lia altvalora laboro: kaj lingvoeksperimento kies rezulto vi povas legi sur aliaj paĝoj. Jen propono:- Tuj skribu mallongan raporton pri tiu artikolo, citante la fonton kaj sendu ĝin al via loka ĵurnalo. Ni ne kaŝu nian lumon!

- 0 - 0 - 0 - 0 - 0 - 0 - 0 - 0 -

BUCKHAVEN-kaj-METHIL - GRUPO havas klason ĉiumarde en la lernejo en Leven. Bedaŭrinde neniuj novaj lernantoj sin prezentis. Nia Grupo kontaktis la Esp-grupon en Trelleburg, Svedujo kaj jam interŝanĝis leterojn, bildkartojn ktp. Ni nun registras sonbendon do sendos ankaŭ audeblajn salutojn.

David Cairns, Sekretario.

(Antaŭ iama tempo la magistrato de Leven decidis amikiĝi kun urbo en Svedujo. Aŭdinte pri tio, F-ino Sinclair, pere de la Jarlibro, proponis liston de taŭgaj urboj (en ili funkcias Esp-grupoj !) La urba instanco la liston kaj elektis el ĝi - Trelleburgo-n. Bone farita, F-ino S.

MARI MORISON

Robert Burns

Ho Mari, en fenestro sidu,
Jen vokas rendevua horo!
Rigardoj viaj al mi ridu,
Pli riĉaj ol kovata oro.
Ho sklavus mi kun gaja koro
En tag-al-taga monoton'
Se rekompencus min trezoro:
La bela Mari Morison!

Hieraŭ laŭ la kordo trema
La balo ondis, torĉobrile.
Mi sidis blinda, surda, ĝema,
Kaj al vi flugis revflugile.
Jen damoj belis florsimile,
Aŭ pompis kiel la madon',
Sed tamen sidis mi ekzile,
Ĉar mankis Mari Morison.

Trankvilon mian ne frakasu,
Por vi mi mortus ja volonte,
Nek mian koron krevi lasu
Ĉar vin ĝi amas senresponde.
Se vi ne amas min renkonte,
Do flegu per kompatodon'!
Malmilda sent' ne povus fonti
El kor' de Mari Morison.

Tradukis el la Skota
Reto Rossetti.

L I N G V A E K S P E R I M E N T O

Nia bonekonata samideano, Reto Rossetti, tradukis en Esperanton la poemon "Tam o' Shanter" de Robert Burns. Tiu traduko aperis en "Esperanto en Skotlando" (N-ro 49, Januaro, 1963).

Esperantistoj ne malofte pretendas, ke Esperanto estas, interalie, vere bona traduklingvo, kaj ke ĝi ofte eĉ superas naciajn lingvojn kiel tradukilo. Je apero de tiu traduko "Tam o' Shanter", ideo trafis nin - kial ne fari etan eksperimenton, kial ne provi taksi ĉu Esperanta traduko egalas, ĉu ĝi eble superas, tradukon en naciaj lingvoj? Poemo de Robert Burns, ni diris al ni, estas taŭga ilo por tia eksperimento, ĉar nia nacia poeto estas mondkonata kaj liaj poemoj estas jam tradukitaj en multajn el la naciaj lingvoj.

Nu, ni sciis, ke nia eksperimento ne povos pruvi ion, ĉar la eksperimento tuŝos nur la enhavon de la tradukado kaj lasos tute flanken la gravan aferon de formo/stilo/beleco, kiujn ecojn oni devus mezuri komparante unu tradukon kun alia. Krome, eble ja variis la kompetento de la diversnaciaj tradukintoj de nia elektita poemo, eble varias la kompetento de niaj helpontoj - ĉar por la eksperimento ni bezonos helpon de samideanoj en alilandoj, kelkaj el kiuj eble pli ol aliaj zorge kaj plene faros sian taskon. Jes, ni komprenis, ke por ĝuste taksi la valoron de traduklingvo ni bezonus ekzameni tradukojn de poezio kaj ankaŭ de prozo, kaj en multe pli ol unu peco. Tamen eĉ se la eksperimento nenion pruvos ĝi eble servos almenaŭ kiel indikilo pri Esperanto, en komparo kun naciaj lingvoj, kiel traduklingvo - almenaŭ laŭ-enhave.

Ni, do, decidis fari la eksperimenton, kaj jen kiel ni ĝin entreprenis. Ni skribis al kelkaj fidindaj kaj kompetentaj alilandaj Esperantistoj, petante ke ili faru parafrazon de la unuaj 36 versoj de sia nacia traduko de "Tam o' Shanter", kaj sendu al ni. Ni atentigis, ke ili nepre ne unue tralegu la Skotan originalon (en okazo, ke iuj el la alskribitoj povus legi kaj ĝuste kompreni tiun originalon), kaj, krome, ke ili ne unue tralegu la Esperantan tradukon de Rossetti: ili atentu nur al la nacia traduko, kaj en Esperanton ĝin parafrazu: la parafrazo estu en kiel eble plej

simpla lingvo, kun nenia strebo al belliteratura stilo: la parafrazo redonu la tutan signifon, kaj nenion krom la signifo, de la nacia traduko.

Parafrazoj de tradukoj el sep lingvoj, du el la rusa lingvo, poste alvenis al ni, kaj ni krome havigis parafrazon de la samaj 36 versoj el la Esperanta traduko, kaj ankaŭ parafrazon (en Esperanto kompreneble) de tiuj versoj el la originalo de Burns.

Por kompletigi la eksperimenton ni sendis al Skota Esperantisto (ne-poeto) ĉiujn parafrazojn, kaj ni petis lin tralegi, kompari kun la originalo, taksi la fidelecon al la originalo laŭ fakteca signifo, kaj fine statistike resumi, indikante (unue) kie mankas io, kio enestas la originalon, kaj (due) kie troviĝas io, kion la originalo ne havas. Per tio ni havus indikilon rilate nian lingvon, se nur kiel laŭ-enhavan kaj ne kiel stilan, tradukilon.

La petito faris sian taskon, kaj jen lia resumo:
La poemo "Tam o' Shanter" iras kvazaŭ rakonto, kaj epizodoj, aŭ ideoj, sekvas unu la alian. Ekzemple, la unuaj kvar versoj priskribas la okazon, la horon, la staton de la stratoj. Mi do rigardas tiujn kvar versojn unuo, kaj komparis zorge kun la diversaj parafrazoj: la sekvantaj du versoj priskribas 'nin', kiuj sidas ĉe la biero, kaj konsistigas duan kompareblan unuon, kiun mi siavice komparis: la tri postsekvantaj versoj faris trian unuon,kaj tiel ĝis la fino de la 36 versoj.

Nu, makuloj ĉe tradukoj estas el almenaŭ du tipoj; (1) ne tre gravaj, ekz. ellaso de, ni diru, priskribaj vorto aŭ vortoj, kio vere ne tusas la faktecan enhavon de la verko (mi citu el "Tam o' Shanter", kie Burns skribis 'auld, haunted kirk'. Se la parafrazo tekstas nur 'malnova preĝejo' aŭ simple 'preĝejo', mi taksis tion negrava kaj registris en la unua kolono de la posta listo. Same se nur 'sinjorinoj' por 'gentle dames'); kaj (2) pli gravaj makuloj, t.e., ellaso de frazo aŭ frazeto ne tie aperanta: tiajn mi registris en la dua kolono de la listo.

Jen la statistika listo:-

	(1) Vortaj, negravaj makuloj		(2) Frazaj, pli gravaj makuloj	
	Ellasoj	Aldonoj	Ellasoj	Aldonoj
Esperanta	11	2	6	2
Hungara	2(x)	0(x)	2(x)	1(x)
Sveda	7	2	3	2
Ĉeĥa	7	2	4	4
Itala	0	0	0	0
Franca	7	2	4	5
Germana	6	2	5	6
Rusa	15	8	7	8

Notu:- (x) La Hungara parafrazo ampleksas nur la unuajn 12 versojn, anstataŭ la unuajn 36 versojn.

Rilate tiujn frazajn ellasojn kaj aldonojn, estas neeble en iom skiza resumo - kaj eble tro montrus personan preferon, personan vidpunkton - tiujn mezuri, unu kontraŭ alia, laŭ graveco. Mi do ne pen-is fari tion. Ekzemple, (temas pri la drinkado kun Kirkton Jean), mi nombris unu aldono la Esperantan "kun brako ĉirkaŭ la talio de J", kaj ankaŭ nur unu aldono mi nombris la Rusan "(vizitis la preĝejon) por pli poste kun plena kruĉo la tutan nokton pasigi kun preĝeja servisto aŭ ebriiĝi, drinkante kun diakono!".

Je ekrigardo al tiu supra listo, oni ja dirus, "La Itala havas neniajn ellasojn aŭ aldonojn. Ĝi, do, estas ja la plej bona traduko" Oni rajtus tion diri, ĉar la parafrazo montras, ke la Itala deprenas ja nenion de, kaj aldonas nenion al, la fakteca enhavo de la originalo. Kaj jen kial la eksperimento ne povas pruvi ion, povas esti nur interesa indikilo - ĉar traduko de poezio devas celi rimon kaj ritmon similan al la originalo - kaj pri tiuj ecoj ni ne havas informon, ĉu? Jen, ni havas. La Itala parafrazinto, feliĉe, kunsendis kun sia parafrazo la plenan tekston de la Itala traduko de la poemo, kaj ni do povas kompari. La Itala traduko estas laŭvorta traduko de la originalo, verson post verso: ĝi tute ne rimas, kaj ĝi tute ne ritmas.** Ĝi efektive ne montras ian ajn poezian econ. Kontraste kun la 8 kaj 9 vokalan verson, la ceteraj versoj ampleksas, tute hazarde tra la tuto, - 11 ĝis 22 - vokalajn versojn: ĝi fakte estas sen-rima kaj senritma proza traduko linion post linio. Ni kompreneble konstatu, ke tia estas la traduko, kiun la Itala parafrazinto trovis dum li serĉis Italan tradukon de "Tam o' Shanter". Ni ne imagu, ke ne eblas en Itala lingvo traduki, se oni tiel celus, "Tam o' Shanter" en rima kaj ritma formo.

Parenteze, ankaŭ la Franca parafrazinto kunsendis plenan tekston de la Franca traduko. Tiu ja rimas, sed ne tute kiel la Burns originalo; ĝi rimiĝas la unuan kun la kvara verso, la duan kun la tria, kaj tiel tra la traduko. La Francaj versoj ne estas tiel longaj kiel la Italaj, tamen ankaŭ ili ne ritmas simile al la originalo sed ampleksas ĝis 12 - silabaj versoj.

Sekve de la hazarda, ekster-eksperimenta, alsendo de la plenaj Italaj kaj Francaj tradukoj, ni eble rajtas kompari la Esperantan (kiun vidu) en N-ro 49. Ni trovas ke ĝi, male al la Itala kaj iome al la Franca tradukoj, rimas kaj ritmas. Ĝi rimas tute kiel la originalo (ĉiu duo da versoj unu kun la dua), kaj ĝi ankaŭ simile ritmas (8 - kaj 9 - vokalaj versoj).

Entute ni rajtas pretendi, ke Esperanto almenaŭ ne malsuperas naciajn lingvojn kiel tradukilo por poezio.

Permesu aldonon! Ĉu la alilandaj tradukintoj trafe tradukis la Skotajn esprimojn? Nu ĝenerale jes. Ekz. "folk begin to tak the gate" estas laŭ la parafrazoj tute bone tradukita per "ekiras hejmen", "ekforiras", k.s., kvankam laŭ la Hungara tio estas, "faladas eksteren la homoj el la pordego!"

Kaj fine, por diversaj apartaj vortoj kompreneble proponiĝas diversaj, pli/malpli trafaj tradukoj: unu ekzemplo sufiĉas - por "mosses, waters, slaps and styles" aperas, tra la parafrazoj, bariloj, malhelpoj, kavoj, kavaĵoj, marĉoj, deklivoj, krutoj, barieroj, kampgrimpŝtupoj, akvoj, marĉejoj, riveroj, hegoj, fosaĵoj, morastoj (?) sovaĝaj kampoj, boskoj, pontaĉoj, trapasvojoj, transirejoj kaj pontejoj. (Vidu paĝon 6)

W. Clarke

**Nia Itala helpanto elserĉis du tradukojn, sed ambaŭ estis prozaj, linio pro-verso-tradukoj.

Estas interese rimarki, ke en ĉiuj lingvoj krom la Germana kaj la Rusa, la tradukistoj redonis la iom surprizan diron de Burns, ke Tam o' Shanter trinkadis kun Kirkton Jean "eĉ ĉe la preĝejo". Kompreneble iuj el la Skotaj tekstoj diras, "That at the L---d's hoose even on Sunday" kiu, laŭ iuj, signifas, ke Tam drinkis en la trinkejo de du fratinoj kies gastejo pro tio nomiĝis "The Leddies" (La Sinjorinoj).

Tamen la ordinare akceptita teksto diras, "That at the Lord's hoose - - - . La Germana traduko kuraĝe kaj ordeme (?) deklaras, ke Tam kuŝadis en gastejo apud la preĝejo; dum la Rusa pli singarde diras, ke Tam unue vizitis la preĝejon por poste trinkadi kun preĝejoservisto (lasante la leganton supozi laŭplaĉe pri la preciza loko de l' drinkado). La Esperanta, kompreneble, fidele ripetas la neversajnaĵon, "Ke eĉ en la preĝej' vi trinkis" (niaj substrekoj ambaŭloke).

Ni registru dankon al la parafrazintoj sen kies helpo ĉi tiu studo ne povus esti. Ili estas:-

Prof. E. A. Bokarev,	Moskvo
Louis Chasseriaud,	Royan, Franĉujo
Jozef Chvosta,	Podebrady, Ĉeĥoslovakio
A. D. Cook,	Earlston, Skotlando
Jozef Kühnel,	Hamburgo
Luigi Minnaja,	Romo
Petro Poliŝĉuk,	Taŝkent
D-ro F. Szilagyi	Boras, Svedujo

Dankon ankaŭ al "Mitchell Library", Glasgovo, pro la afabla faciligo al nia kopiado de diverslingvaj tekstoj el volumoj alie ne alireblaj por ni.

EDINBURGO

Komencis sian studsezonon per Literaturo-Ekspozicio kaj kelkaj el la vizitantoj aniĝis. Stimula programo inkluzivas "El la Ĉapelo", "Juveloj de Esperanta Literaturo", "Interesaj Homoj". Je la unuaj merkredoj de Novembro kaj Decembro oni kunvenis por tre ĝuataj "Gaja Vespero"-j. La Societo nombras 67 el kiuj 7 estas junuloj.

* * * * * * * * * *

KIRKCALDY

Kun Methil kaj Buckhaven Grupo, kaj vizitantoj de Dundee kaj Edinburgo, celebris Zamenhof-Vesperon je sabato la 7a de Decembro. S-ano Jack Casey faris en nemultaj sed trafaj vortoj la honorparoladon. Li ankaŭ montris filmon pri la Vraca Kongreso de T.E.J.O., kaj la Esperanta libertempejo ĉe Primoŝten, Jugoslavio. Ne mankis muziko aŭ kantado - aŭ manĝado!

LA LUNO KAJ MENSMALSANO

En pasintaj jarcentoj ekzistis kredo pri rilato inter la luno kaj la mensa stato de la homo. La luno, kaj speciale la plenluno, laŭ tiu kredo, havas fortan efikon sur la mensoj de iuj homoj, kaj ofte eĉ kaŭzas frenezecon. La origino de la angla vorto "lunacy" ŝajne donas iom da apogo al tiu teorio. Oni citas plurajn kazojn, en kiuj la periodo de la mensmalsano kaj la plenluno koincidis. Antaŭnelonge, en certa lernejo regis estro, kies agoj de tempo al tempo estis iom nenormalaj, eĉ strangaj. La stabo rimarkis, ke tiuj nenormalaj periodoj okazas dum la tempo de la plena luno. Kiam en ĉiu monato alproksimiĝis la plenluna sezono, anoj de la stabo, iom ŝerce, atentigis unu la alian pri la eblecoj.

Lastatempe mi diskutis ĉi tiun temon kun plurjara Esperantista amiko mia, kiu loĝas en la centro de Eŭropo, kaj kiu mem forte kredas je la interrilato de plenluno kaj homa menso. En mia letero mi esprimis mian skeptikon pri lia kredo, kvankam mi alte taksas lian opinion pri pluraj mondaferoj, ĉar li mem estas kvazaŭa filozofo. Respondante, li rakontis al mi la jenan personan sperton, por subteni sian opinion. Jen parto de lia respondo.

"Pri la lunmalsanoj mi ne samopinias kun vi, pro tio ke mi, kiel ankoraŭ knabo, tian homon vidis kaj konis. Ŝi estis knabino tre delikata, el bona familio komercista. Ĉiam ŝi estis tre pala, sed eble ĝuste pro tio, ŝi treege plaĉis al ni buboj, kaj ni donis al ŝi kromnomon, "porcelana pupeto". Ŝia familio havis belan vilaon kun granda ĝardeno, ĉar ŝia patro pasie kulturis la fruktarbojn. Tiaj ĉerizojn, kiaj estis tie, troviĝis nenie alie. Do, kompreneble, ni buboj devis gustumi ilin. La barilo de la ĝardeno, kvankam masonita kaj garnita supre per vitropecoj firme starantaj en la mortero, prezentis al ni nenian malhelpaĵon, ĉar sufiĉis duoble faldita sako kaj la vojo estis glata kiel tablo.

Estis ĉirkaŭ la dekunua horo nokte, kiam ni, rikoltante la ĉerizojn, subite ekvidis en la lunlumo, ion helan alproksimiĝantan al ni. Unue ni volis malaperi; sed, ĉar ni aŭdis ian grumbladon aŭ krion, ni enŝovis nin post la ribarbetojn kaj, eĉ ne spirante, rigardis la aperaĵon. Estis nia "porcelanpupeto" en nokta robo. Ŝi nudpiede iris sur la vojeto, malrapide, la vizaĝon ŝi tenis turnita al la luno, sed

la okulojn ŝi havis fermitaj. Ni rigardis ŝin tute konfuzitaj, ĉar ni ne sciis pri kio temas. Ŝi tiel bele ridetis, ke ni ŝajnis vidi anĝelon. Ŝi preterpasis nin, ĉirkaŭiris la duonon de la ĝardeno kaj denove malaperis en la domon. Ni nur miris ke ŝi, kun fermitaj okuloj (aŭ eble nur ŝajnis al ni, ke ili estas fermitaj), ne surtretis iun bedon kaj ne koliziis kun arbo.

La sekvintan tagon ni lerte demandis ŝin pri tio, kion ŝi ŝonĝis, sed ŝi sciis pri nenio. Tamen la malpurigitaj piedoj perfidis ŝin, kaj la gepatroj poste forsendis ŝin en ian instituton por nervaj malsanoj, ĉar ili sciis pri ŝia malsano. Ŝi revenis hejmen eble post duonjaro, laŭdire sana, kaj fakte, kvankam ni dum lunlumaj noktoj pli ofte "deĵoris" sur la muro de ilia ĝardeno, neniam plu ni vidis ŝin promeni en la ĝardeno. Cetere, ŝi restis tute normala knabino, tre bela kaj talenta, sed ĉiam ŝi restis "porcelana".

En la jaro 1914, mi foriris en la militon kaj ne plu vidis ŝin. Post unu jaro mi ricevis Kristnaskan forpermeson kaj venis hejmen. Tiam ŝi jam estis fianĉino, kaj post la Nova Jaro estis edziniĝonta. Bedaŭrinde, post la Kristnasko falistiom da neĝo, ke la tramo ne funkciis, kaj "pupeto", ne volante atendi ĝis oni liberigos la relojn, decidis iri hejmen piede. Sed ŝia koro ne eltenis la streĉigan vojon en profunda neĝo. Ŝi alvenis hejmen, sed tute laca, sidiĝis, poste kuŝiĝis. Malgraŭ la rapida alveno de kuracisto, en la sama nokto ŝi mortis. Mi vidis nian "pupeton" en la ĉerko sed la enterigon mi ne ĉeestis, ĉar mi devis dume forveturi al la regimento.

Do, mi opinias ke ekzistas homoj, je kiuj la luno efikas, eĉ kiam ili ne scias pri tio. Alian kazon mi vidis en la batalkampo, kie unu soldato, ankaŭ "porcelana", kutimis promeni, dum lunlumaj noktoj, tra la tranĉeoj. La kuracisto zorge esploris lin, kaj poste forsendis lin el la skadro.

D. Kennedy

GLASGOVO FESTIS

La Glasgova Esperanto-Societo festis je la 23a de Septembro, pasintan jaron la datrevenon de sia fondiĝo en 1903, per kulturo vespero en Grand Hotel, Charing Cross. La programo inkluzivis paroladon de S-ano Kennedy, Prezidanto kaj S-anoj Miskimmon, Neil kaj Pastro Martin, kaj ĉiurilate estis digna kaj ĝuinda okazo.

ONI NE RAJTAS TIMIGI INFANON

de

Jiřina Trojanova

Ĉiutage ni leviĝas pli palaj; pli multe elĉerpitaj; okulfrape ni malgrasiĝas. Dum nia laboro ni ekdormas, precipe ĉe kunvenoj kaj konferencoj. Nia laborpotenco malpliiĝas; ankaŭ nia vivĝojo. Sed la infano floras! Ni opinias la kvaran horon matene, horo de plej dolĉa dormo por ĉiuj justuloj; sed nia infaneto vekiĝas ĝuste en tiu horo. Sed se ĝi nur vekiĝus! Ne, ĝi leviĝas, rozkolora kiel suno kaj plenega de vivemo. Ĝi ŝancelas forte la reton de sia liteto kaj vokas, "Hej riga'du!. La edzo mallaŭte ekĝemas kaj tiras la litkovrilon super sian kapon. Mi ankaŭ. Sed tio neniel helpas, ĉar la infano kategorie postulas, "Manĵi!" Poste, "T'inki". Ĝi ricevas ĉion - ni ja ne estas senamaj gepatroj. Ĝi tion agnoskas kaj komencas kanti kontente. Nepre estus pli bone havi nemuzikeman idon. Poste ĝi strebas transgrimpi la reton, ĉar ĝi estas ankaŭ entuziasma pri gimnastiko. Baldaŭ ĝi senbremse - falas. Kriego.

"Mi frapos ĝin plurfoje sur la sidvangoj!" mi decidas. "La infano ne estas batenda," rifuzas la edzo. Li estas sentema. Li diras, ke tio estas perforto farata al malpli forta kreito. Tiu senarma kreito saltetas sur lia ventro. "Danci, danci" ĝi babiletas dolĉe. Tiel la tempo forpasas ĝis la sesa. La infano laciĝas, ekoscedas kaj endormiĝas. Por ni, sonoras la vekhorloĝo . . . . . .

Niaj kunlaborantoj komencas flustri pri ni, ke ni vivas videble diboĉe.

Okazis iun matenon, kiam la infano ĵus vokis, "Hej riga'du!", ke la hundo de najbaro ekbojis. La fileto senprokraste silentiĝis, falis en sian liteton kaj vokis, "Do'mas, hundo do'mas." Kaj ĝi mem ekdormis. Al tiu hundo ni donacis oston sur kiu estis minimume kvaronkilogramo da viando. Sed ĝi montriĝis maldankema. La sekvan tagon ĝi ne bojis. En malespero mi mem ekbojis. La eksperimento estis diletanta kaj la infano ekridis gaje. Tial ekbojis la edzo aldonante timigan murmuradon. Li havis eminentan sukceson. La infano tuj silentiĝis kaj endormiĝis.

La liberan tempon dum la sekvaj tagoj ni komencis eluzi por pliperfektiĝi en bojado. Sed ni devis ĉesigi tion. La edzo timegigis sian sekretariinon kiam ŝi portis poŝtaĵojn al li kaj aŭdis lin boji ĉe la fenestro. Mi, profunde enpensiĝinte, komencis murmuri dum konferenco kaj konsciiĝis pri tio nur kiam estiĝis granda silento. La kunlaborantoj nun komencis konduti al ni delikate kaj konversaciis pri siaj konataj psikiatroj kaj simile. La estro dediĉis al mi tubeton da kuracilo, menciante kuraĝige, ke tio estas kuracilo per kiu oni kuracas eĉ gravajn kazojn de skizofrenio. Sed kiom gravas ? ni ne plu bojis pro tio, ke la infano malkovris ĉion kaj respondis al nia bojado per gaja, "Haf Haf!" Tio estis multe amuza. Almenaŭ la diableto amuzis sin.

Poste la edzo havis genian ideon, ke estos plej bone boji en la ĝardeno. La infano estas saĝa; ĝi scias, ke la hundo estas ekstere kaj ne en la dormoĉambro. Do, li eliris en sia piĝamo eksteren tra la fenestro kaj bojis kaj murmuris kurante tien reen en la ĝardeno por ne tro malvarmiĝu. Denove li estis sukcesa. Sed eble la kvinan tagon - la edzo raŭkis kaj lia temperaturo estis plialta - la infano ekkomprenis la situacion kaj anoncis, "Paĉjo bojas!" Ĝuste antaŭ ol ni elĉerpiĝis tute, alvojaĝis la avino. Ni diris ĉion al ŝi. Ŝi preskaŭ ekfuriozis. "Tia skandalo! Boji al kompatinda infano! Ĉu vi ne legas porvirinajn revuojn? Ĉu vi ne aŭskultis radioprogramojn por patrinoj? Oni ne rajtas timigi infanon!" Ŝi nomis nin fihomoj kaj forprenis la infanon.

Por ni venis la tempo de feliĉego. La hundo de najbaro, kanajlo, bojis nun ĉiumatene ek de la kvara ĝis la sesa, sed tio estis bela, aŭdi la bojadon de hundo. Mi sincere sciigis la edzon, ke li jam preskaŭ iĝis malsimpatia al mi pro sia bojado. Li sincere konfesis al mi, ke li sentis saman malsimpation al mi. Ni denove reamikiĝis . . . . . La dekan tagon alvojaĝis la avino kun la infano. La avino iom malgrasiĝis; ŝi aspektis elĉerpita. Al nia saluto, ŝi respondis per raŭka, "Vrr! Haf!" Poste ŝi rekonsciiĝis; nomis nin frenezuloj kiuj frenezigis infanojn kaj maljunulinojn; kaj metis sur la tablon dikan pakaĵon. "Mi ŝparis per tomboŝtono!" ŝi informis. Ni ektimis. "Sed mi ankoraŭ ne bezonas

ĝin, "diris la avino grandstile, "Kaj per tiu mono mi aĉetis jenon!" La "jeno" estis magnetofono. Sur la sonbendo estis konservitaj metroj - ja, kilometroj da hunda bojado. Tio estis ĝemado de hundidoj kaj sufokiĝa raspado de ĉambraj hundoj; estis tie averta murmurado de luphundoj kaj hurlado de vilaĝaj hundoj dum plenlunaj noktoj kaj basa kantado de bernardhundoj en montara ŝtormo. Ĉio estis perfekta hunda serenado.

Je la kvara matene ni ekfunkciigis la magnetofonon. La anĝeleto aŭskultis ravite. Poste ĝi ordonis, "Ankoraŭ!" Ĝi persistis ĝis la sesa. Post kelkaj noktoj mi konstatis, ke la skandalaĵo de infanaĉo estas vera nirvano kompare kun la hurlado de vilaĝaj hundoj kaj aparte kun la bernardhundo en montara ŝtormo. Nome tie ne bojis nur unu bernardhundo sed la tuta hundaro; la avino ne ŝparis. La infano ploreme anoncis, ke ili dormas kaj nur poste mem ekdormis.

Ĝi nun ĉiutage dormadas ĝis la sepa. Sed koncerne la edzon la afero estas stranga. Je la kvara li leviĝas, prenas la magnetofonon kaj iras kun ĝi en la kuirejon, de kie post momento aŭdiĝas obtuze la kriado de ĉiuj ĉi hundaj voĉoj. Eble tamen, li saniĝos el tio, ĉar hodiaŭ matene venis letere el la urba estrejo. Ĝi invitas, ke la edzo venu, por ke estu esplorita la posedado de hundoj sen pago de la preskribitaj impostoj.

Elĉeĥigis Josef Ĉhvosta,
Podebrady, Ĉeĥoslovakio.

KONSILANTARA KUNVENO

La 12an de Oktobro kunsidis en Synod-Halo la Konsilantaro de S.E.F. Prezidis S-ino Mackay. La kunveno decidis plialtigi la prezon de "Esperanto en Skotlando" pro la ĉiam ŝrumpanta kaso kaj samkiale la kotiso po ano de la filiiĝantaj grupoj estis fiksita je ses pencoj anstataŭ kvar, krom por junuloj 18-jaraj.

S-ano Mackay raportis, ke nia 59a Jar-Kongreso okazos inter la 22a kaj la 24a de Majo, 1964, en la tre taŭga kaj belega Carberry Tower, 9 mejlojn sudoriente de Edinburgo.

GRATULO - STIMULO

Leganto kiu abonas dek ekzemplerojn de la Bulteno por flegi siajn alilandajn amikojn ricevis leteron de unu el ili de Praha el kio li citis, "Mi tralegis atente ankaŭ la artikolon pri la T.E.J.O.-Kon: greso en Vraca kaj pli plaĉis al mi la rakonto de Jack Casey, kies stilo estas pli flua, sukoplena kaj interesa ol la samtema artikolo en - - -" (alia multe pli grava eldonaĵo ol ĉi tiu). Nia Leganto aldonas, "Eble mencio pri tiu opinio en estonta numero de "Esperanto en Skotlando instigos al aliaj junaj Skotoj ion verki en Esperanto".

Bone faris S-ano R. Hamilton, Glasgovo, kies letero al "New World" responde al atako kontraŭ nia lingvo, estis unu el la du kiujn la redaktoro elektis por preso el "scores of others for and against Esperanto".

Dankon al S-ano R. Mackay, Edinburgo, kiu sendis al ni gazeteltranĉaĵon raportantan (Peggy Phillips en "Scotsman") Festivalon de Televido en Londono. Ŝi ve-kriis pri la ĝismorta tedo de inform-T.V.-programoj en nesciataj lingvoj. Ŝajnas, ke ŝi tute ne ekpensis pri la simpla, nia, solvo; sed rekonante, ke la lingva baro plagas, rekomendas, ke oni minimumigu paroladon kaj maksimumigu vidaĵon - kuracu langon per eltranĉo! Se ni konas S-anon Mackay, Peggy jam ricevis taŭgan admonon!!!

De Ges-anoj Peggy kaj Petro Harvey, Glasgovo, ni aŭdas, kun ĝojo, ke formiĝis, je 28/11/63, Springburn Esp.Grupo, el la ge-parencoj kaj amikoj de la infanoj de la Junuleta Rondo. Ĉi tiu daŭre kunvenas ĉiu -sabate kaj unuiĝos kun la plenkreskula, nova organizaĵo unufoje ĉiumonate - 26a Decembro, KristnaskoFesto; 23a Januaro, Burns-Vespero; 27a Februaro, dua datrevenoFesto de "Muzika Espero, Junuleta Rondo".

La Fervojista Klubo kunsidas ĉiumerkrede kun pluso de du novaj lernantoj. Petro delegitis en Parizo ĉe la Jarkunveno de Francaj Fervojistoj je 1/12/63. Ĉeestis ankaŭ delegitoj de Nederlando, Germanujo kaj Belgujo.

oOoOoOoOoOoOoOoOoOoOoOoOoOoOoOo

STRATHKINNESS, 1964.

"Youth House", en la malnova, pitoreska vilaĝo, Strathkinness, tri mejlojn okcidente de St. Andrews, Fife, denove verdiĝos dum semajnfino, kiam fariĝos la Esperantujo de Fife-Stud-Rondo. Jam 17-foje ni printempe kunvenadis tie. Ĉi jare la datoj estos:-

Vendredon la 17an de Aprilo ĝis Lundo la 20a.

Plena programo pretiĝas; regululoj ricevos ĝin fine de Februaro. Aliaj skribu por ĝi al la Sekretariino, ĉe la Redaktora adreso.

M. C. Fraser.

Koran gratulon al du junaj Skotoj kiuj unuarange sukcesis en la mezgrada ekzameno de R.S.A. Ili estas, Jack Casey kaj David Kelso.

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

Por literaturamantoj:-

Fife-Stud-Rondo diskutis du malfacilajn poemojn kaj la studon poste partoprenis kelkaj alilandaj interesatoj. Raporto pri la studo estas havebla ĉe la redaktoro. Enlandanoj sendu afrankitan koverton; eksterlandaj sendu stelon aŭ respondkuponon.

KUL